

Literatura Mondo, 15-a parto :
Karikature de Julio Baghy : La propagandisto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 641, 1976.01.21 & 24

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ĝis 1934 **Julio Baghy** ludis ĉefrolon en **Literatura Mondo**. Liajn novelojn, karikatureojn kaj vidpunktojn tre ŝatis kaj facile komprenis la legantoj. Kiel ni jam rakontis, **Julio Baghy** kverelis kun **Kolomano Kalocsay** pro sia ĝisosta kontraŭstaro al la enkonduko de neologismoj en literaturaj verkoj. Kaj ĝuste tiun ĉi lingvaĵon sufiĉe simplan, kie forestas tro komplikaj vortoj, ŝategis la esperantistoj.

A.- Sed alia karakterizaĵo de **Julio Baghy** favoris lian kontakton kun la publiko. Ĝin bone reliefigas Ferenc Szilágyi en studo dediĉita al la hazardo en la esperanta literaturo. Ferenc Szilágyi interalie skribas :

Cl.- « Por Julio Baghy la rakonto estas ne nur rakonto, sed tezo. Julio Baghy estas pastro, kiu diras : Hodiaŭ mi predikos pri io kaj jen la ekzemplo. Li estas moralisto. [...]

A.- Jen ero el unu el tiuj predikoj de Julio Baghy. Ĝi aperis en la rubriko **Mia Angulo**, kiun **Literatura Mondo** rezervis al Julio Baghy en la jaro 1932. Ĝia titolo : **La propagandisto**.

Cl.- « Li estas konstante ebria pro siaj ideoj. Li rifuzas manĝi viandon, naŭze turnas sin for de la fumantoj, kondamnas eĉ la bier-trinkantojn je frua morto aŭ je mensa bankrotiĝo. Pro **naturamikeco** li havas sandalojn kaj obstine lasas hejme sian ĉapelon. Pro sia proleta mondpercepto li rifuzas la lukson de kolum- kaj kravat-portado, sed por demonstracii pri sia neŭtralisma **interna ideo** li ne toleras la verdan stelon kun **ruĝa** kadro en la butonruo de sia jaketo. La ruĝa kadro estas politiko. Li estas membro de UEA kaj de SAT. Li havas membrokartojn de IKUE kaj de UEA. Li estas samtempa aprobanto de pastro Andreo Ĉe kaj s-ro Robert Kreuz. Li havas provizon da elastaj argumentoj en la kapo kaj faskegon da diversaj presaĵoj en sia aktujo.

A.- Al ŝovinistoj li parolas pri l' uzo de Esperanto dum la mondmilito en la germana propagando kaj avertas, ke la burĝa ideologio baldaŭ falos, se la amikoj de l' nuna mondordo cedas Esperanton kiel monopolon al la proletaro.

Cl.- Al pacifistoj li asertas, ke la germanoj estas venkitaj pro l' misuzo de Esperanto kaj Pan-Eŭropo aŭ UŜE (tio estas Unuigitaj Ŝtatoj de Eŭropo) ne estas atingebla sen tiu ĉi lingvo.

A.- Al klaskonsciaj laboristoj li proponas la lingvon el vidpunkto de internaciismo kaj promesas per ĝi baldaŭan faligon de l' kapitalismo.

Cl.- Al kapitalistoj li aŭguras nepran kaj centprocentan profiton per la enkonduko de la lingvo.

A.- Al katolikoj li predikas pri « Unu ŝafisto kaj unu ŝafejo », en kiu la ŝafaro nur Esperanton blekante povos kompreni unu la alian, kaj li ne forgesas mencii, ke **malgraŭ tio**, ke « tiu » Zamenhof estis judo, tamen li havis krucifikson en sia laborĉambro laŭ aserto de E. Privat.

Cl.- Al protestantoj li montras la Biblion, kaj ĉe judoj li prisilentas la krucifikson kaj per memfarita genealogio li klopodas pruvi, ke la Majstro devenis rekte de reĝo Davido kaj pro tio ĉiu judo plenumas gentan devon lernante la lingvon.

A.- La unuan fojon mi renkontis lin en kafejo. Por pli komforte observi lin, mi kaŝis mian verdan stelon. Li staris kaj parolis al siaj « disĉiploj ».

Cl.- « Jes, karaj geamikoj, mi estas la homo de la praktiko. Neniam mi lernis Esperanto el libron. Min ne interesiĝas la gramatikon, ĉar ĝi malfaciligas la uzado de la lingvon.

A.- Tuj oni povas konstati tion – rimarkis iu el la rondo de l' « geamikaroj ».

Cl.- - Kial ? Ĉu pri tiun malbenitan akuzativon ? – li temperamente sin defendis. - La akuzativo ne gravas. La plej ĉefa estas la praktiko kaj la interna ideo sen aŭ kun akuzativon. ... Mi volas raportiĝi pri miaj sukcesoj.

A.- Li prenis notlibreton el sia poŝo kaj laŭtlegis.

Cl.- - Sabate : algluo de du mil sigelmajloj en ĉiu vagono de la subteraj fervojoj. Ok horojn mi laboris sub la tero. Elspezo nur 70 centimojn, kiuj vi redonos al mi el la propaganda kaso. Dimanĉe : mi partoprenis en ekskurso. Vestita en mia propaganda kostumo kun la broditaj verdaj steloj kaj kun la surskribo « Lernu Esperanto ! », « Vivu Esperanton ! » mi trabikiklis la urbo kaj la arbaro. Nepriskribbla sukceso. Ĝis raŭkiĝo mi parolis kaj disdonis tri mil diversajn foliojn kaj vendis eĉ du gramatikojn. ... Elspezo ne estis. Lunde : mi faris planon por mardo. Marde mi kontrolis la lunde farita plano kaj vespere mi vizitis la kunvenejon de la Verda Koko, kie mi vendis dekkvin insignojn. La vendiĝo donas profito 20 frankoj al la propaganda kaso. Merkrede mi legis la leterojn, kiuj alvenis dum la lastajn tagojn. Terrura laboro. Multaj samideanoj uzas tiajn vortojn, kiuj mi ne renkontiĝas en mian praktikon. Elspezo 5 frankoj por vortaron. Ĵaŭde : mi renkontis kun unu viro sur unu strato. Li demandis pri la verda stelo en mia jaketo. ... Vivu Esperanton ! ... »

Cl.- Poste Julio Baghy priskribas la blekadon de la himno, kies duan strofon li jam ne aŭskultis. Li rifuĝis el la kafejo konkludante, ke « se Esperanto iam venkos, tio okazos spite al ĝiaj fervoraj propagandistoj, kiuj nur praktikas kaj praktikas. »

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

(Bibliografio : Literatura Mondo 1932 p. 155.)